

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 40-a BRAZILIO, APRILIO-MAJO-JUNIO 2016 N-ro 162

“Amu vian Dion per via tuta koro
kaj per via tuta animo kaj per via tuta
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.*
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante
unu la alian, la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero.*

"LAŬ NIA OPORTUNA TEMPO, NI BONFARADU AL ĈIUJ". (Galatoj, 6:10)

Estas sciata de kristanoj, ke fido sen bonfaroj estas malviva (Jakobo, 2:17), laŭ instruoj de la Majstro Jesuo. Tial, konsilindas reliefigi la bonfarojn, por ke ili estu utilaj kiel modeloj. Ne temas pri nutrado de fierco kaj vanteco, sed provo stimuli en ni la senton pri tio, ke ĉiam eblas labori en la konstruado de socio pli justa kaj frata kaj kun pli da amo.

Jen kion diras al ni la belaj vortoj de teksto de muziko de 'Carlinhos Conceição', kantata en multaj spiritismaj centroj de Brazilo kaj tuŝantaj tiujn ĉi sanktajn urĝejoj:

“En ĉi-ejo mi malkovris min,
Ekvidinte solvon tuj post eniro.
Jes, en ĉi-domo de amo,
Sangantaj vundoj cikatriĝis
En konstanta kun bonfaroj rilatiĝo.”

Surbaze de tio, spiritismaj centroj kreas kaj subtenas diversajn servojn de apogo al la necesbezonantoj kiel spirita orientado, klar(kler)igado kaj konsolado pere de studgrupoj, disdonado de nutraĵoj, vestaĵoj kaj medikamentoj, dent-kuracado, vizitado de maljunuloj kaj malsanuloj, inter aliaj.



La mediumo Chico Xavier, aŭtoro de pli ol 400 psikografitaj libroj



Ĉi-eldone, ni elstarigas la fru-fruajn laborojn de spiritisma institucio, ĵus inaŭgurita, la 10-an de junio 2016, en urbo Uberaba, subŝtato Minas Gerais, brazila sudoriento. Temas pri la Memorajejo Chico Xavier (Ŝiko Ŝavieĥ), funkcia en la tiama loĝejo de Chico Xavier, senkompara kristano kaj mediumo, kies elektita standardo estis la karitato al ĉiuj.

Krom funkcii kiel gardejo de la apartenaĵoj de la granda mediumo, ĝi rakontas lian tutan vivhistorion kaj ankaŭ havas vastan programon inter studoj, prelegoj, amika akceptado kaj orientado, fluigado de magnetaj kaj spiritaj emanaĵoj ktp.

Tiel same kiel Chico Xavier estas ekzemplo de homamo por ĉiuj, lia memorajejo certe iĝos ia lumturo por la spiritisma movado entute: ke ĝi sin okupu en la farado de la bono. Tiel, ĉiu spiritisma centro el la mondo estos, ankoraŭ konforme al la vortoj de la supre citita poeto:

“Sukurejo, anim-hospitalo
Forigante dolorojn, transcendajn traŭmatojn.
Laborfronto ĉiujn starigante.
Urĝejo de Di,
Ho! Lernejo sankta!”



Brunilde Mendes do Espírito Santo, 93 jara, elstara spiritistino, estas unu el la anoj de Asocio Lorenz. Ŝi estas aktiva verkistino en la portugala lingvo kaj jam verkis pli ol 10 librojn. La lastaj libroj de Brunilde estis la serio Herooj de la Homaro: Albert Schweitzer, Marie Curie, Madre Teresa de Calcutá kaj Pestalozzi.

Brunilde, sendube, estas ekzemplo por ni ĉiuj: laborema, bonkora, ĝentila... preta helpi ĉiujn.

Elkoran dankon, kara fratino Brunilde!



KUNLABORU! – Membroĝi ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

COLABORE! – *Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!*

LORENZ

“KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 40-a – n-ro 162 | Aprilo-Majo-Junio 2016

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonaĵoj: + 55-21-2221-2269 - + 55-21-2450-4768
Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>

Estimataj gelegantoj,

Unu fojon pli, Eldonejo Lorenz frapas vian pardonon. Ĉi-foje per la 162-a eldono de Komuniko. Ni daŭre kalkulis je helpo de multaj amikoj kaj dankas ilin tutkore pro la konstantaj apogo kaj sindediĉo.

Ni malfermas ĉi-eldonon per nelonga ĉef-artikolo pritraktanta kelkajn servojn de spiritismaj centroj favore al niaj kunvojaĝantaj gefratoj. Kompreneble, antaŭ la devoj de la vivo, temas nur pri simplaj agoj. Tamen, ni esperas, ke la tuŝantaj faroj kunlaboros por vekti en la homo ties antikvaj animvalorojn, nuntempe sufokitajn de la ‘moderna’ mondo, tiom dediĉita al la akirado de materiaj havaĵoj, en kies scenejo ni batalas, por ke la verbo ‘esti’ havu pli da gravo ol ‘posedi’.


Laŭ simila rezonlinio, sekvas aliaj temoj kiel tiuj pri niaj kunlaborantoj, libroj, aranĝoj, studgrupoj, kuriozaĵoj kaj mesaĝoj apartenantaj al el- kaj en-karniĝintaj spiritoj, laborantaj, sub la egido de karitato, por la estigo de interhoma harmonio kaj disvastigado de Esperanto.

Bonan legadon!

LANĈO

Eldonejo Lorenz lanĉis novan libron de Brunilde Mendes do Espírito Santo, PESTALOZZI, la kvaran de la serio “Herooj de la Homaro”.

La lanĉo okazis en la Spiritisma Domo Hejmo de Teresa, en Rio-de-Janeiro, kiam pli ol 120 homoj ĉestis la eventon. Profesoro Cesar Soares dos Reis prelegis pri la temo de la libro kaj S-ino Brunilde aŭtografis sian verkon.



Kompostita de Rogério Mota

Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



Al s-ro M- -v.

Ni uzas ordinare la formon "konatiĝi" (= fariĝi konato kun iu), sed ankaŭ la formo "koniĝi" estas tute bona (= fari sin koni ion). En la plena vortaro ni donis la vorton "krom"; sed poste, vidante ke kelkaj amikoj per la vorto "ekster", kiu ekzistas en la malgranda vortareto, kvankam sub iom alia senca nuanco, tute bone esprimas ankaŭ la sencon de "krom", ni komencis ankaŭ uzadi tiun ĉi vorton en la senco de "krom".

Al Guminskij, 24.II.1891

Tre estimata amiko!

Mi ricevis vian leteron kun la 9 rubloj, promesoj kaj uzitaj signoj de poŝto. Mi sendis al vi hodiaŭ la librojn, kiujn vi petis kaj ankaŭ la gazeton "La Esperantisto" de n° 1 ĝis n° 12 de la pasinta jaro. La n° 1, 2 kaj 3 de la nuna jaro vi ricevos post 6-8 tagoj el Nurnbergo.

De sinjoro Molgaĉev mi ricevis antaŭ 4-5 monatoj leteron, tiam li ankaŭ petis librojn, kiujn mi sendis al li; sed de tiu tempo mi havas de li ankoraŭ nenian sciigon. Sinjoro Weber kredeble nenion faras por nia afero; antaŭ 5-6 monatoj mi skribis al li leteron, sed mi ricevis de li nenian respondon, mi havas de li nenian sciigon kaj ankaŭ inter la abonantoj de la "Esperantisto" mi lin ne trovas.

Al s-ro R-d.

La diferenco inter "kiu", "tiu" k.c kaj "kia", "tia" k.c. estas sekvanta: la formoj kun "u" estas puraj pronomoj kaj la formoj kun "a" estas pronomaj adjektivoj significantaj econ. "Kia" = "kian econ havanta" k.c. Al la vorto "kiu" vi povas respondi per substantivo, dum al la vorto "kia" vi devas respondi per adjektivo. Ekzemple: je la demando "kiu domo" vi respondas "tiu domo" (jenes Haus), "tiu ĉi domo", "la domo de la patro" k.c.; sed je la demando "Kia domo" vi respondas: "tia domo" (ein solches Haus), "tia domo kiel mia", "alta domo", "longa domo", "bela domo" k.c.

30 JAROJ POR ESPERANTO!



La duan de Aprilo 2016, pli ol 100 homoj ĉeestis la datrevenon de la Grupo de Esperanto Pac-horo por festi 30 jarojn de fekunda ekzistado.

La programo, gvidita de la geedzoj Alexandre Machado kaj Érika Ueoka, estis tre riĉa: prelego de Eduardo Ferreira pri la temo "Jesuo kaj Vi", belaj kanzonoj prezentitaj de la koruso KORESC, lotumado de diversaj premioj, kaj ankaŭ la grupo lanĉis la libron "Jesuo kaj Vi", kies aŭtoro, Eduardo Ferreira, ĝin aŭtografis ĉe la fino de la kunveno.

La Grupo Pac-horo donacis al ĉiuj, kiuj partoprenis la eventon, belan globkrajonon.

Antaŭen kaj supren kun la benoj de Zamenhof!





rientu bone vian energion, por ke ĝi ne fariĝu aroganteco kaj perforto.

Vi povas kaj devas esti energia, tamen neniam agresema.

Estas normale, ke vi vin sentu ĝoja pro viaj rimedoj, tamen ne fariĝu fanfaron.

Kiam la tento de revenĝo embarasas vian distingokapablon, reagu severe, tamen sen troigo.

La forto, kiu edifas, ankaŭ detruas.

La fortuloj kaj temperamentaj finas la tagojn nerve malsanaj kaj solaj.

El la libro “Vivo Feliĉa”

Diktita de la Spirito: Joanna de Āngelis

Mediumo: Divaldo Pereira Franco

Tradukita el la portugala: Osvaldo Pires de Holanda



Joanna de Āngelis estas pseŭdonimo de la aŭtorino de la libro “Vivo Feliĉa”. En la lasta reenkarriĝo ŝi vivis en la urbo Salvador (ŝtato Bahia, Brazilo), kie ŝi naskiĝis en la 11-a de decembro 1761. Kiam ŝi estis 21-jara, ŝi eniris en la Monahinejon Lapa, kaj ŝi ricevis la nomon Joana Angélica de Jesus. Pro siaj meritoj ŝi fariĝis abatino en 1815. Dum la bataloj pro la sendependigo de Brazilo ŝi estis mortigita en la 20-a de februaro 1822.


En la spirita mondo ŝi laboras por la progreso de la homaro, kaj jam diktis, pere de la mediumo Divaldo Pereira Franco, multajn librojn, kun belaj kaj utilaj mesaĝoj bazitaj sur la Evangelio de Nia Sinjoro Jesuo la Kristo.

En 1651 ŝi renaskiĝis en San Miguel Neplante, en Meksiko, kun la nomo Juana de Asbaje y Ramirez de Santillana, kaj ŝi fariĝis monahino kun la nomo Soror Juana Inés de la Cruz.

En la epoko de Sankta Francisko de Asizo ŝi vivis en Italio, kaj estis disĉiplino de Sankta Klara.

En la tempo de Jesuo ŝi estis Joana de Cusa, en Romo. En la jaro 68 p.K. ŝi estis mortigita kune kun la filo kaj pli ol kvincent kristanoj, kiuj estis bruligitaj, kaj la flamoj eĉ lumigis la urbon. Ŝi vivis en Kafarnaŭm, kaj akompanis Jesuon. Sed ŝi estis la edzino de intendanto de Antipas. Ŝia edzo ne havis la saman intereson por spirita progresado, kaj ne akceptis la doktrinon de la Majstro. Tial Jesuo konsilis al ŝi, ke ŝi sekvu Lin de malproksime pro la sinteno de la edzo.

Divaldo Pereira Franco ofte ricevas ŝian viziton, kaj longe konversacias kun ŝi.



Karaj ekster brazilaj legantoj, se vi volos ricevis la verkon “Vivo Feliĉa”, SENPAGE, sciigu nin kaj tuj vi ĝin ricevos.

Dankon!

Eldonejo Lorenz

editora_lorenz@uol.com.br

LORENZ



En la jaro 1906, en la ĉefurbo Porto Alegre, brazila subŝtato Suda Riogrando, la oficiala tradukisto **CHRISTIANO CRAEMER** (kiu konis diversajn lingvojn) kune kun **REYNALDO FREDERICO GEYER** (unu el la fondintoj de la bulteno Brazila Esperantisto, en 1907), kaj aliaj personoj, kreis en Porto Alegre la “Esperanto Societo Sud-Riogranda”. Ĝi estis la 1-a Gaŭĉa Esperanto-Societo, kun 122 societanoj!

La estraro estis la jena:

Prezidanto: Christiano Craemer
Vic-prezidanto: Joaquim A. Ribeiro
1^a Sekretario: Reynaldo Frederico Geyer
2^a sekretario: Helmut Pohlmann
Kasisto: Ilídio Augusto

Louis de Beaufront estis tiam prezidanto de la “Franca Societo de Esperantisto” kaj granda disvastiganto de Esperanto, precipe per sia revuo “L’ Esperantisto”.

La “E-Societo Sud-Riogranda” ricevis de Zamenhof kaj de Beaufront poŝtkartojn kun la jenaj tekstoj:

Varsovio, 28-X-1906

Karaj Sinjoroj!

Al la Esperanta Societo Sud-Riogranda, mi sendas koran saluton kaj deziron de plej bonaj sukcesoj.

Via,
Zamenhof

P.S.: La titolon de Honora Prezidanto, afable donacita al mi de via Societo, mi akceptas kun kora danko.



Louviers, 20-10-1906

Kara Sjoro,

Mi tutekore dankas la Esperantan Societon Sud-Rio-Grandan pro la honoro, kiun ĝi faris al mi kaj volonte akceptas la titolon “Honora Prezidanto” de tiu ĉi nova familio esperantista.

Ĝi brilege sukcesu kaj konstante pligrandiĝu en la belega tero de Brazilujo, kiun mi vizitis antaŭ multaj jaroj!

Kun amika saluto por via Societo kaj Vi Mem.

Kore via,

L. de Beaufront



Ni rekomendas

Brazila samideano, Paulo Cesar Pires, diskonigas sian “Tutmondan Taglibron”.

La celo de la retejo estas praktiki redaktadon kaj Esperanton. Por ĝin koni, alklaku la suban retadreson:

<https://sites.google.com/site/taglibroj>

TUTMONDA  **TAGLIBRO**

Senpagaj libroj...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage.

Sufiĉas nur sendi al ni vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al

editora_lorenz@uol.com.br

LORENZ



Havano Oficiale Iĝis Mirinda Urbo

Sur la ĉieloj de la longa kariba insulo, la plej granda en tiu regiono, aperis, la 7-an de la pasinta decembro, novaĵo, kaj ekde tiam ĝi ŝvebis dum longa tempo kiel ĉielarko bunta, precipe super la kuba ĉefurbo, Havano.

La menciita sciigo konsistis en ke Havano meritis, kune kun ses aliaj urboj de la tuta mondo, la distingon kiel Mirindan Urbon de la moderna mondo, kaj tiu ĉi 7-a de junio estis oficialigita kiam la urbego ricevis la atestilon en ceremonio okazinta sur la esplanado de la Kastelo de Sansalvadoro de la Pinto (San Salvador de la Punta). Oni tiel konfirmis la rekonon atribuitan al la rezulto de la balotado farita de centoj da milionoj da homoj en la tuta

mondo per cifereca balotilo. Tiu konkurso estas trifoje organizita de la svislanda Fondaĵo New Seven Wonders (N7W). S-ro Bernard Weber, prezidanto-fondinto de N7W-Fondaĵo esprimis: "La nova sindevigo, kune al aliaj landoj premiitaj, estas ke tiu memoro plimultiĝu kaj evoluu".

Mirindaĵo ne estas perfekteco sed surprizo, magio, originaleco. Sendube estas multaj mirindaĵoj en tiu ĉi loko: la arkitekturaj valoroj, la homoj, la aromoj kaj precipe, la amika koro de la havananoj spite al ĉiuj mankoj kaj malfacilaĵoj ĉiutagaj.

Tiu distingo ankaŭ salutas kaj bonvenigas la datrevenon de la urbo, kiun oni festos en la jaro 2019.

Jen bona ideo!

Kariokaj geesperantistoj renkontiĝas por manĝi, interbabili kaj diskonigi Esperanton en la agrabla restoracio "Bongustega".

Informis: Evandro Caboclo – Rio-de-Ĵaneiro - Brazilo



KUNLABORU! – Membrigu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

COLABORE! – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!